# Boletín

Del Grupo Esperantista **Fido kaj Espero**

**Januaro-Februaro 2012**

**Nº 248**



**Dirección de correo electrónico:** lhernandezg@ono.com
Dirección Postal:Pedro A. **Garrote Escribano** : C/ Las Mercedes, 5-5º-C
Adherido a la Federación Española de Esperanto


## Editorial

Una vez más, aunque lamentablemente con la mente puesta en una próxima desaparición, publicamos este Boletín del Grupo Esperantista de Valladolid en la que recogemos, según nuestro modesto criterio, aquello que consideramos de mayor interés para los socios y simpatizantes.

Desde el año 1959, en que se creó el Grupo, muchas han sido las vicisitudes por las que el mismo ha pasado. De todas ellas, en mayor o menor grado, se ha publicado información tanto en los diversos boletines publicados por el Grupo, como en la prensa esperantista, tanto nacional como internacional.

Cuando en el año 1998, con idea de revitalizar la vida del grupo, se celebró el Congreso Nacional de Esperanto, el tercero de los celebrados en nuestra Ciudad, no conseguimos, lamentablemente, nuestro propósito; pero, gracias a una parte del beneficio conseguido, se mejoró la situación económica, que permitió continuar con la edición del boletín; contando, además. con la aportación económica de unos pocos y leales compañeros.

Lamentablemente, por razones de edad y tiempo, algunos de ellos nos dejaron y consecuentemente se perdió su aportación económica, lo que nos obligó a reducir, en la medida de lo posible, los gastos originados por la edición del Boletín.

Por sí ello no fuera suficiente, considerando que la cuenta de ahorros que teníamos en Caja España, por las medidas fiscales del Gobierno y el nulo o escaso movimiento que tenía, no producía mas que gastos, optamos, las personas con capacidad para hacerlo, por cancelar dicha cuenta y remitir su saldo, en cumplimiento de lo establecido en los estatutos, a la Federación Española de Esperanto.

Aun cuando el Grupo de Valladolid desaparezca o más bien quede en estado letal, hasta que venga alguien, con entusiasmo e ilusión, que lo reanime, queremos animaros a que sigáis con el Esperanto, idioma que aprendimos en los distintos cursos impartidos en nuestra Ciudad y lo practiquéis siempre que podáis, bien leyendo libros o revistas en dicho idioma, bien participando en alguno de los encuentros y reuniones que se celebran a lo largo del año por todo el mundo.

## GRAVA JUBILEO DE ESPERANTO

En la nuna jaro 2012, la esperantista komunumo festas la 125-jariĝan jubileon, kaj Universala Esperanto-Asocio instigas la esperantajn asociojn kaj la individuajn membrojn aranĝi diversajn agadojn tiucele.

Verdire, Esperanto plifortiĝis kaj tutmondiĝis ekde kiam aperis la unua libro pri Esperanto en Varsovio, kaj malgrau ĉiaj malfacilaĵoj, oni povas diri ke Esperanto sufiĉe bone evoluis kaj sukcesis. Post la unuaj jaroj de entuziasmo, kaj malgraŭ la du mondmilitoj, Esperanto daŭre kreskis, kvankam ankoraŭ restas multe da laboro farenda.
La Universalaj Kongresoj, ekde la unua okazinta en Boulogne Sur Mer (Francio) daŭre estis kaj estas la granda renkontiĝo inter esperantistoj de la tuta mondo.
Tie oni havas okazon ne nur praktiki la lingvon, fari geamikojn kaj aŭskulti prelegojn, sed ankaŭ konstati iom malpli konata de la lokaj grupoj aŭ izolitaj esperantistoj.
Nome, la kvanton da sciencaj atingoj, la grandan nombron de fakaj asocioj, la efikan grandan laboron de la estraranoj de UEA kaj de aliaj asocioj, la klopodojn pri eksteraj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, kaj aliaj mondaj organizoj, ktp.

Nuntempe en la sino de UEA troviĝas bona nombro de fakaj asocioj, la plej multnombraj fervojistoj kaj katolikoj, bone funkcias la Internacia Kongresa Universitato (IKU) dum la universalaj kongresoj, kie fakuloj prelegas pri diversaj sciencaj temoj; gravega estas la laboro de ILEI, disvastigante Esperanton tra la mondo,nun ankaŭ tra la reto,kaj ni ne povas forgesi la seriozan laboron de la Akademio de Esperanto kaj de multaj aliaj instancoj kaj iniciatoj.
La Akademio Internacia de Sciencoj (AIS) de S. Marino, nun en serioza kaj profitdona kunlaboro kun UEA, ofertas sciencajn sesiojn, eĉ AIS-retkurson

Certe la esperantistaro kaj la formoj lerni la lingvon ne estas la sama ol antaŭe. Dum en Eŭropo la esperantistaro, ĝenerale, maljuniĝas, en Afriko kaj Azio floras la junularo. Dum en antaŭaj tempoj la "interna ideo" sukcesis kuraĝigi la esperantistaron, nune multaj lernas Esperanton nur kiel lingvo, dum en pasinta tempo la laboro de la E-Grupoj estis esenca por la instruado kaj praktiko de Esperanto, nune multaj lernas ĝin tra la reto kaj laboras per komputiloj, dum la Grupoj kaj lokaj asocioj ĝenerale lamas, kiel la nia en nia urbo.
Ni ĉiuj certe rememoras la tempojn kiam nia Esperanto-Grupo gaje festis la Zamenhofan Tagon kaj la Semajnon de Internacia Amikeco per diversaj prelegoj kaj aranĝoj. Nun ni sidas en kafejo preskaŭ solaj. Ni eĉ estis sidejo de tri Naciaj Kongresoj.

Kio okazis, do, por tiu nuna neaktiveco en nia agado? Certe ni jam ne havas sidejon, ni ĉiuj maljuniĝis, multaj gravaj aktivuloj jam forpasis, ni eble ne sciis kiel altiri gejunulojn, sed nia pasiveco faras ke nia loka grupo mortiĝas. Pro tio, tiu ĉi bulteno povas esti unu el la lastaj dum iom da tempo.

Tamen mi esperas ke novaj esperantistoj ekagos en nia urbo, ke ili partoprenu universalajn, regionajn, aŭ naciajn kongresojn, ĉar se ni restas ene de nia hejmo, ni ne povas konstati ke ekstere daŭre moviĝas la mondo, kaj ke Esperanto estas tutmonda interkomprenilo kiu funkcias tre bone por la internaciaj rilatoj . Pro tio Esperanto festas gaje tra la mondo sian 125 jariĝon .

**Mª Rafaela Urueña**

# Congreso de Esperanto



**Almagro,** la capital histórica del Campo de Calatrava (provincia de Ciudad Real), en la comunidad autónoma de Castilla-La Mancha, será la sede del 71 Congreso Nacional de Esperanto que se celebrará entre los días 27 de abril y 1 de mayo de 2012. Para el día 2 de mayo está prevista una extensión turística para visitar alguna de las localidades vecinas

**Almagro** es un importante conjunto histórico-artístico y enclave turístico y, entre sus principales monumentos, destacaremos: su Plaza Mayor porticada en orden toscano

, en su origen plaza de armas y posteriormente centro de una feria de comercio, de planta rectangular irregular y dos pisos, inspirada en las flamencas, y su famoso Corral de Comedias del siglo XVII, el único que se conserva íntegro de esa época.

El Palacio del Conde de Valparaíso, construcción del siglo XVIII, actualmente sede cultural gestionada por la Diputación de Ciudad Real será la sede principal, aunque parte de las actividades tendrán lugar en otros emplazamientos de Almagro y de la provincia de Ciudad Real.

El Congreso, organizado por la Asociación Castellano-Manchega de Esperanto, tendrá como lema *"Esperanto: 125 años derribando fronteras"*. Y entre los actos previstos figuran, teniendo en cuenta la tradición de la localidad que acoge el Congreso, un Festival de Teatro, que cree un nexo de unión de la ciudad con la tradición cultural del esperanto

En este año se conmemora el 20 aniversario de la escuela ibérica de literatura en esperanto, conocida en el mundo esperantista con el nombre de ***Iberia Skolo*** y con tal motivo se programarán conferencias y otras actividades sobre el esperanto como lengua literaria, a cargo de escritores integrantes de la Escuela.

Otros muchos actos, tanto culturales como creativos, están previstos tales como proyección de películas en Esperanto, visitas turísticas a los principales monumentos de Almagro, presentación de libros, curso elemental de esperanto para los habitantes de Almagro que estén interesados, así como otras actividades que se concretarán a medida que se vaya acercando la fecha de su celebración

L. Hernández

# Tra la Mondo

## Nova ekspozicio en la Esperanto-Muzeo




La 28an de januaro estis inaŭgurita nova ekspozicio en la nomata Hispana Esperanto-Muzeo situanta en la urbeto Sant Pau d'Ordal (municipo de Subirats, pro kio ĝi estas nun oficiale nomata *Muzeo de Esperanto de Subirats*), je 50 km de Barcelono.

La ekzpozio, kun la titolo "Somera semajno post la Tragika Semajno", temas pri la 5-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis en septembro de 1909 en Barcelono, kaj en la socia etoso en kiu ĝi okazis, malmulte da tempo post gravaj sociaj malordoj, kies centro troviĝis ĝuste en Barcelono, kaj kiuj kaŭzis dekojn da mortintoj.

La Muzeo de Esperanto de Subirats estis kreita de Lluís Hernández Yzal, dum multaj jaroj vicprezidanto de HEF, kiu dum sia tuta esperantista vivo kolektis imponan aron da ĉiaj materialoj rilataj al nia lingvo (el la retpaĝo de HEF)

## Dennis Keefe elektita Esperantisto de la jaro 2011



La gazeto La Ondo de Esperanto post voĉdonado inter 15 elektantoj deklaris Dennis Keefe la Esperantisto de la jaro 2011.

Dennis Keefe, 60-jara usona instruisto, nun en la universitato en Nankino (Ĉinio), internacie konata iniciatinto de Lingvaj Festivaloj, estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2011 pro la universitat-nivela disvastigo de Esperanto en Ĉinio kaj pro la evoluigo de la projekto "Esperanto-Insulo" en Hajnano.

(el Libera Folio)

## Esperantista ministro en Slovenio




La iama esperantisto kaj ano de la Eŭropa Parlamento, Ljudmila Novak, estos la nova ministro pri "slovenoj eksterlande" en la freŝa registaro de Slovenio. En sia posteno kiel eŭropa parlamentano ŝi antaŭ tri jaroj proponis enkondukon de Esperanto kiel komuna lingvo de Eŭropa Unio




# Humoro



**¿Buen deseo?**

A mí me gustaría que mi suegra fuera una estrella.
- ¿Sí? ¿Para que te lleve a Hollywood?
- No, para que esté a 3.000 años luz

## Menuda tienda



Un hombre entra a la ferretería.
- ¿Señor tiene clavos?
- No, no tengo.
- ¿Y pintura?
- La verdad es que tampoco tengo.
- ¿Y un serrucho?
- Mire señor, para serle franco no tenemos nada.
- Bueno, ¿y entonces por qué no cierra?
- ¡Porque no tengo candados!



**Paciente obediente**

- Doctor, doctor, no he notado ninguna mejoría con su tratamiento.
- ¿y se ha tomado el jarabe que le receté?
- Pues ¡como me lo iba a tomar!, si en el frasco pone "Consérvese bien cerrado".

## Malbonŝanco



Oni ludis pokeron tra tuta nokto. Finfine mastrino de la loĝejo ekkoleris:
- Ĉu vi iam ĉesos tiujn ludojn en nia domo?!
La mastro:
- Mia kara, ĝi jam ne estas nia domo!



## Ne normala prelegejo

Estas tria horo post noktmezo. Policisto haltigis sur strato iun viron.
- Kien vi direktas vin tiel malfrue?
- Al prelego pri moralo.
- Ne elpensu! Kiu organizas prelegon pri moralo tiutempe?
- Mia edzino

## 20-a INTERNACIA ESPERANTO – SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO 2012




## CAMBRILS

De la 6-a ĝis la 13-a de oktobro 2012. okazos en la bela turisma urbeto Cambrils, la jam tradicia kaj amikeca renkontiĝo en kiu partoprenas geesperantistoj el diversaj partoj de la mondo, ĉefe el Francio kaj Hispanio. Por la ĉijara renkontiĝo estis elektita la kvarstela hotelo Best Cambrils situanta en la Avda. Diputació, 141

Periódico

GRUPO ESPERANTISTA
C/ Las Mercedes, 5-5º-C
47006 VALLADOLID